



Tuj antaŭ la estrarkunsido alvenis tre pozitiva raporto pri la Konferenco de ILEI – kio bezonis tujan plukomunikon al la Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj aliaj. Efektive, multo el la promesita helpo realiĝis, kun imponaj rezultoj. Al la jarfine kreita PDF-versio de la komuniko ni permesas al ni aldoni kelkajn fotojn el la Konferenco.

Ekde nun, jen la originala teksto de la komuniko:

=====

Karaj,

Mi salutas vin el Roterdamo, kie ekde morgaŭ la estraro de UEA kunsidos tra la semajnfino.

Mi kaptas la okazon plusendi bonvenan raporton de Radojica Petrović, la sekretario de ILEI (nia instruista ligo), kaj ties estrarano pri konferencoj. Ĝi povos utili al tiuj el vi, kiuj planas ĉeesti la UKon en Bonaero, ĉar la ILEI-konferenco en Montevideo plenumas omaĝon al signifoplena loko por Esperanto:

=====

La 24-an de marto 2014 delegitaro de ILEI kaj de LKK de ĝia 47-a Konferenco (19-25 julio 2014) vizitis la regionan sidejon de Unesko en Montevideo kaj interparolis kun respondeculino pri edukado, Maria Paz Echeverriarza, kaj respondeculo pri kulturo, Frédéric Vacheron, ambaŭ en la Oficejo por grupo de landoj (*Cluster Office*): Argentino, Brazilo, Ĉilio, Paragvajo kaj Urugvajo. Ambaŭ akceptintoj montris bonan komprenon pri Esperanto ne nur kiel lingvo, sed precipe kiel movado por celoj parencaj al tiuj de Unesko, do dezirinda partnero de Unesko. Sekve ili esprimis intereson pri kunlaboro pri la 47-a konferenco de ILEI okazonta en Montevideo.

La delegacio konsistis el Sonia Risso, prezidantino de LKK, Radojica Petrović, sekretario de ILEI kaj estrarano pri konferencoj, Ana Montesinos, komisiito pri la konferenco 2014 kaj Daniel Bebelacqua, LKK-ano.

S-ino Maria Paz Echeverriarza emfazis la novan rigardon al la temo 'edukado' kiun Unesko havas danke al la ĝenerala direktorino Irina Bokova. Laŭ la nova dujara plano por edukado mondscale, en la kvin regionoj de Unesko oni laboras por plibonigi la kvaliton de la instruistoj. Tiu laboro estas tre grava en Sudameriko, sed restas malfacile plenumebla pro grandaj problemoj en aliaj mondopartoj. Ŝi ankaŭ klarigis la mekanismojn de komunikado kaj decidado inter diversaj niveloj de la organiza strukturo de Unesko.

Ŝi akceptis nian inviton kaj peton kontribui al la Konferenco de ILEI kaj Simpozio pri la konferenca temo depende de sia disponebleco dum la konferenca semajno. Ŝi proponas jenajn kontribuojn:

- Se estos en Montevideo ĝustatempe, ŝi volonte parolos pri la plano de Unesko pri edukado dum la simpozio aŭ alimomente dum la konferenco
- Ŝi donis al ni nomon de renoma urugvaj fakulo pri lingvistiko, Virginia Bertolotti, kiuj povus diversmaniere kontribui al nia konferenca temo, aŭ proponi siajn kunlaborantojn kaj studentojn por tiurilata kunlaboro

- Ŝi skribos al sia direktoro kaj petos kontribuon al nia konferenco, almenaŭ sendi salutmesaĝon por la inaŭguro.
- Ŝi sciigis nin pri kion kaj kiel peti ĉe la Ministerio pri Eduko kaj Kulturo, kiu respondecas pri la Leĝa Palaco, en kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko aprobis la rezolucion pri Esperanto el la jaro 1954. Ilia kontribuo povus konsisti el nur ĝenerala vizito de la konferencanoj tra la palaco, aŭ eventuale formala akcepto en la salono en kiu la rezolucio estis aprobata.

S-ro Frédéric Vacheron prezentis al ni agadon de Unesko en la kampoj pri kiuj li specife respondecas kaj pretas kunlabori: minacataj lingvoj kaj protektado de valoroj de materia kaj nemateria kulturo kaj de la naturo kiel homara heredaĵo.

Li rekomendis, ke ILEI petu aŭspicion de la Ĝenerala Direktoro por la Konferenco en Montevideo. Konsiderante la agadon de ILEI kaj celojn de la konferenco li kredas, ke ne estas kialo por malaprobi la aŭspicion. La limdato submeti la peton estas tri monatoj antaŭ la evento. La aŭspicio plifaciligus subtenon de lia kaj aliaj sektoroj de Unesko al la Konferenco. Li pretas plu kunlabori ankaŭ sen la aŭspicio, tamen kun ĝi ĉio estus pli farebla. Depende de tio, ĉu li estos en Montevideo dum la konferenco, kion oni kutime ne scias ĝis unu monaton antaŭe, li decidus ĉu li mem alparolos la konferencanojn, aŭ sendos salutmesaĝon, aŭ alimeniere montros sian atenton. Li restos en kontakto kun ni kaj povos komunikigi nin kun siaj kolegoj el aliaj sektoroj de Unesko kiuj povos rilati al la konferenca programo.

-----

Jen pozitivaĵoj pri tiu konferenco de ILEI, kiun oni povus taksi iel kiel antaŭkongreso por UK, kun pli labora kaj ne tiom turisma enhavo. Ni gratulas al la agintoj pro la bonaj novaĵoj!

===== Vortoj de la dissendita teksto: 647 =====



La parlamento de ekstere kaj interne



Konferencanoj en la aŭlo de la parlamentejo, kie okazis sesdek jarojn pli frue la fermo de la Ĝenerala Konferenco de Unesko kiu akceptis la rezolucion favore al Esperanto (vidu paĝon 8 de Jarlibro 2014)